

Bô Yin Râ

**LA LIBRO  
PRI LA FELIÇO**

KOBERSCHE VERLAGSBUCHHANDLUNG AG  
BERN

La portanto de la spirita nomo Bô Yin Râ havis en sia ĉiutaga vivo la familian nomon Schneiderfranken kaj la antaŭnomojn Joseph Anton.

El la Germana originalo  
(„Das Buch vom Glück“, dua eldono de 1957)  
tradukis A. Rehfeldt (<http://www.a-rehfeldt.de>)

Unua eldono 1920

## PRELUDO

Ĉu vi iam vidis infanon, kiu konstruis kaste-  
lon el sablo kaj, fininte sian verkon, gaje klakis  
per la manoj? — —

Tie ĉi vi trovis vian majstron, vi, kiu sopiras  
*feliĉon...*

Tie ĉi estas homo, kiu *trovis* la feliĉon, kaj se  
vi ne volas serĉi la feliĉon *same kiel infano*, vi  
vane suferos soifon pri via feliĉo.

Ĉiu surtera feliĉo, kaj nur pri ĝi estu parolate  
en tiu ĉi libro, estas feliĉo de *kreanto*, — ĉu li  
kreas en si la reĝan regnon de la *amo*, ĉu li for-  
mas sian verkon per la *spirito*, aŭ ĉu *materialaj*  
valoroj donas formon al lia krea volo en *mate-  
rio*. —

*Sole* la ĝojo de *kreanto* pri sia verko estas *fe-  
liĉo*, kaj ĉio alia, kion vi, fidante, nomas per tiu  
vorto, certe trompos vin pri via *vera* feliĉo, ki-  
om povas doni ĝin tiu ĉi tero...

Vi, amanto, kiu trovas sian feliĉon sole en sia *amo*, diru al mi, ĉu via amo estas io alia ol ĝojo de kreanto? – –

*Sentoj* estas la *fortoj* de via kreado, kaj se vi estas *vere* „feliĉa“ en via amo, vi konstruis al vi en la regno de sentoj *templon*, en kiun *neniu* krom vi povas eniri, kaj kies plejsanktejo entenas la *diobildon*, al kiu vi, kiel pastro de via amo, volas servi kaj oferi...

Eble vi ankoraŭ ne konsciiĝis, ke tie ĉi vi estas *kreanto*, – sentas vin subigita de sentoj gvidantaj vin, ofte *kontraŭ* via volo, – opinias vin katenita, tamen portante tiun katenon volonte, kaj vivas en la iluzio, ke ĉio ĉi venas nur de ekstere kaj libere procedas je vi laŭ leĝoj eterne enteksitaj en la surtera vivo? –

Vi mem baras al vi la lumon, se vi pensas tiel. –

Certe, vi sekvas eterne nevenkeblan leĝon, se via animo malfermas sin al la fluego de amo, kiu trafluas la kosmon kaj per mistera forto tiras animojn kaj korpojn unu al la alia, sed tiu sekvado nur *promesos* al vi feliĉon, kaj vi neniam

*atingos* vian feliĉon, se via amo ne kapablas ve-  
ki en vi la *kreanton*. — —

Tio, kio poste faras vin vere „*feliĉa*“, estas  
via *propra* verko, — la kreado el la kaoso de sen-  
toj, kaj la sekvo de tiu kreado: la harmonio de la  
animo, kiu *perfektigas sin mem*, kiam ĝi sin *do-  
nacas* al la alia animo. —

Eĉ tiu *seksa ĝuo*, kiun homoj ne konantaj pli  
altan deziron ol la *instinkton de la animaloj* no-  
mas „amo“, *tamen* devigas plej malaltajn sen-  
tojn kreante konstrui trompan kastelon, en kiu  
ili, estante sklavoj de sia mallonga „feliĉo“, sta-  
rigas la idolon de siaj voluptaj revoj.

Sed vi, amanto, kiu volas fariĝi vere „feliĉa“,  
devos serĉi *alian* specon de *feliĉo*, kaj se vi es-  
tas vera *amanto*, la feliĉo de *korpa sentado* ne-  
niam estos al vi apartigebla disde la feliĉo de  
*anima unuiĝo*. —

Nur kiel *kreanto* vi povas trovi tiun *feliĉon*  
*de la animo*. — — —

Vi ankoraŭ lasas trompi vin tre facile kaj  
ĉiutage atendas, ke la feliĉo venu *de ekstere*.

Por unu ĝi estas la amo de amata homo, por alia: verko, kiun li deziras krei, kaj por ankoraŭ aliaj ĝi aperos nur kiel liberiĝo de korpaj mizero kaj zorgo.

Sed eĉ kiam vi fakte konkeris ĉion ĉi, vi fine devas ree kaj ree konfesi al vi, ke io ankoraŭ mankas al via feliĉo, kaj vi maltrankvile serĉos plu, kvankam vi antaŭe kredis esti atinginta la plej altan celon. – –

Vi ankoraŭ ne scias, kian feliĉon la vivo sur tiu ĉi tero kaŝas en si, kaj ke ĝi estas garantiaĵo kaj nutromedio por ĉiu „eterna“ feliĉo. –

Sensenca estos por vi la surtera ekzisto, kaj ĝi fariĝos ĉeno da ĉiutage novaj grandaj aŭ malgrandaj suferigoj, se vi tie ĉi ne trovas vian teran feliĉon! –

Ne kredu al tiuj deprimaj instruoj, kiuj promesas al vi „feliĉon de la eterneco“, se vi *rezignas la feliĉon de tiu ĉi tero!*

Eĉ *tie ĉi* kaj *nun*, en tiu ĉi horo, en kiu vi legas ĉi tion, vi estas *meze de la eterneco*; kaj kion vi ne povas krei al vi *nun*, tion neniu dio povos iam en la eterneco doni al vi...

Vi devos lerni ekkoni, ke ĉiu feliĉo estas nur *sekvo de kapablo*, kiun vi havas en vi, kaj ke vi *neniam* povas fariĝi feliĉa, – nek nun, nek en iu ajn alia formo de ekzisto, – se vi ne *disvolvas* tiun *kapablon*, se vi inerte atendas, ke via feliĉo iam *renkontu* vin, aŭ se vi eĉ kredas, ke ĝi estu *donata* al vi de ekstere kiel „rekompenco“ por viaj faroj, kiel sekvo de „dia justeco“!

Nur kiel *kreanto* vi konkere atingos vian feliĉon kaj daŭre konservos ĝin al vi!

Nur tio, kion vi mem povas konstrui en vi *nun*, kontentigos vin *eterne*!

Nur se vi scias *krei* al vi feliĉon, vi *atingos* vian feliĉon en *ĉiu* formo de vivo! – – –

## LA DEVO ESTI FELIĈA

Nur malmultaj sur tiu ĉi tero vere scias ligi la feliĉon al sia vivo, kaj tiuj malmultaj prefere ne parolu pri sia feliĉo, por ke la envio ne fariĝu ilia subfosanta kontraŭulo.

Sed sennombraj sopiras la feliĉon sen iam trovi ĝin, ĉar ili ne scias, ke nur ili mem povas fariĝi kreantoj de sia feliĉo.

Ili strebas al feliĉo kiel al frukto malpermesita, ĉar ili volas trovi ĝin *kiel donacon*, tamen malklare sentante, ke ĝi estas akirebla nur kontraŭ pago de ĝia justa prezo.

Ekde ilia juneco oni diris al ili, ke ĉiu tera feliĉo estas dono de la *hazardo*, kaj ke al la noblulo decas *ne strebi* al feliĉo.

Neniam atingis ilian orelon iu instruo, kiu parolis al ili pri la *devo* utiligi la vivon sur tiu ĉi tero tiel, ke ĝi fariĝu fonto de konstanta feliĉo.

Certe, ĉiu *ŝatus* „esti feliĉa“, kaj ĉiu provas tion en alia maniero, sed ili volas, ke la feliĉo venu kiel *aldono*, kaj mil aliaj aferoj estas al ili vere *pli gravaj* ol ilia feliĉo.

Sed kiu volas konkeri la feliĉon, tiu devas strebi *nur* al sia *feliĉo*, kaj ĉio, kion li *krome* ŝatas atingi, devas esti *subordigita* al tiu strebado kaj prudente enteksita en ĝi. — —

Neniu alia *deziro* devas malhelpi lian volon krei per sia libera agado la plej grandan feliĉon, kiun tiu ĉi tero povas prezenti al li.

Li taksu neniun alian taskon pli alte ol la devon atingi la plej puran, daŭran feliĉon kaj pli-grandigi la teran feliĉon en si mem, kaj per tio ankaŭ por aliaj.

Ekde plej antikva tempo, fatala instruo asertis, ke la feliĉo de la tero estas atingebla nur por malmultaj, dum ĉiuj aliaj neniam havas alireblon al ĝi.

Oni ne scias, ke tiu ĉi tero havas *senlimajn* eblojn de feliĉo kiel de malfeliĉo, kaj ke ambaŭrilate la *volo* de la homo – *ne lia dezirado* – direktas ĉiun okazadon.

Oni kredas havi „fortan volon“, kaj tamen estas nur sklavo de siaj deziroj, kiuj eble kelkfoje povas movi *iometon* de la volo, pri kies efiko oni modeste kontentiĝas, sen iam strebi *pluen*, ĉar oni kredas esti jam alveninta al la limo de ĉia voloefiko.

Sed se oni scius, kion la volo de homo vere *kapablas fari*, troviĝus baldaŭ sur la tero nombro da feliĉuloj multe pli granda ol kiom kuraĝas esperi la plej aŭdaca revulo, kiu kredas, ke ĉiu eblo de feliĉo dependas de la venko de liaj mondplibonigaj ideoj. – –

Ni *estas* tio, kio ni *esti volas!*

Ni estas „ludiloj de la sorto“ nur tiom longe, kiom ni *lasas* la sorton ludi kun ni. –

Ni estas „persekutataj de la malfeliĉo“ nur tiom longe, kiom ni *kuras antaŭ* la malfeliĉo por eskapi ĝin. –

Ni estas „senheredigitoj pri feliĉo“ nur tiom longe, kiom ni ne volas agnoski ĉies *devon* strebi al sia *plej alta feliĉo* de la tero. –

Ne aspiri feliĉon estas *peko*, sed *pli granda peko* estas: *ne voli krei sian feliĉon tie ĉi!*

Estas peka, kaj blafema kontraŭ la superega potenco de la spirito, la mizera *modesteco*, kun kiu oni aspiras feliĉon.

Por iu homo jam signifas feliĉo, se li povas sen zorgoj nutri sin kaj la siajn.

Alia opinius feliĉo la eblon loĝi en palaco kaj veturi en kaleŝoj.

Ankoraŭ alia serĉas gloron kaj honoron, rangon kaj dignon kiel sian „feliĉon“.

Nur malmultaj scias, ke nek riĉo nek honoro povas doni *feliĉon*, sed ke feliĉo *estas potenco*,

kiu havigas al ĉiu homo ĝuste *tiom* el ĉiuj aferoj de la tero, kiom ĝuste *li bezonas* por feliĉoplena vivo, – ne pli kaj ne malpli. –

Kiu kredas trovi la feliĉon *en la akirado de specifaj teraj posedaĵoj*, tiu ankoraŭ serĉas *tiujn posedaĵojn*, ne la feliĉon!

*Feliĉo estas la kontentiĝo de l' kreanto en lia kreado.*

Sed tiu kreado estas *neniam finita*, kaj la kreanto konas nur „tagojn de ripozo“, sabatojn de la animo, kiuj donas al li novan forton por nova kreado.

*Feliĉulo estas ĉiutempe kreanto kaj neniam laciĝas de sia kreado.*

Tio, kion li kreante formas, estas la *kaŭzo* kaj la kondiĉo de lia feliĉo, sed la feliĉo mem estas lia *potenco*, kiu alkondukas al li ĉion, kio donas al li daŭran kontentigon.

Ne ĉiu bezonas *la samon*, sed ĉiu, kiu entreprenas krei sian feliĉon, akiros *ĉion*, kion *li vere bezonas* por sia feliĉo.

„Celu unue la regnon de Dio kaj Lian justecon, kaj ĉio cetera estos aldonita al vi.“

Kiom oni misinterpretis tiun parolon de la majstro el Nazareto!

Laŭ la libroj priskribantaj lian instruon li ankaŭ diris: „La regno de Dio ne estas tie ĉi aŭ tie; ĝi estas *en* vi!“ kaj per tio montris al *forto en la homo*, kies „justeco“, kies *leĝaj kondiĉoj* estas plenumendaj, se „*ĉio cetera*“ estu „*aldonata*“, – sed *kiu* iam kuraĝis interpreti tiujn ĉi tradiciajn parolojn *tiel*, kiel la majstro estis doninta ilin en la formo de simpla saĝo?

El la „regno de Dio“, pri kiu *li* parolis, malgrandfidaj animoj faris regnon de patose solenaj paroladoj kaj milde konsolantaj esperigoj, aŭ ili serĉis tiun „regnon“, tute kontraŭe al liaj vortoj, ie en malproksima supermondo, ne atentante lian instruon, ke „la regno de la ĉielo estas *proksima*“. – – –

Aĥ, la homo estas tiom firme sub la influo de la fiziksensa perceptomaniero, ke li ne povas ekkoni, ke la „regno de Dio“ povas ek-enerĝii en li, kaj ke la „regno de la ĉielo“ ĉirkaŭas lin ĉiuloke, eĉ se li kredas esti en „infero“...

Li bezonas nur iri „*en sin mem*“, por elfosi neelĉerpeblan trezoron, – li bezonus nur elsendi eksteren la ondojn de la forto, kiun li entenas en si, kaj la vizaĝo de la tero renoviĝus.

Sed al ĉiuj sciantoj en ĉiuj tempoj estis montrate, ke, en tiu ĉi mondoperiodo, ĉiutempe nur malmultaj volas lasi tiun volon al liberiĝo energii en si, kaj ke nova mondoperiodo kaj nova tero devas estiĝi, ĝis la vorto de Paŭlo: „La fervora sopiro de la kreitaro atendas la malkaŝon de la filoj de Dio“, povas fariĝi kosma fakto. –

En la plej multaj homoj la volo estas ankoraŭ tro firme katenita *fare de ili mem* en la „hipnoto“ de la fiziksensa perceptomaniero, ol ke ili kuraĝus direkti la aferojn de la fiziksensa mondo per la *fortoj de la spirito*.

Malgrandfide ili atendas ion, kio alportu helpon mekanike *de ekstere*, aŭ ili jam antaŭ longe enterigis ĉian esperadon kaj atendadon, – kaj nur treege malmultaj kuraĝas entrepreni eĉ nur la *provon fariĝi spiritaj* direktantoj de sia sorto.

Tamen la nombro de tiuj „malmultaj“ povas *pligrandiĝi* ankaŭ en tiu ĉi mondoperiodo, kaj

tiu aŭ alia homo jam havas nekларan antaŭsenton pri potenco kaŝita en li, sen scii, *kiel* li povas *ekprimastri* ĝin.

La instruo en tiu ĉi libro povas montri al li taŭgajn vojojn, kaj tiu, kiu ĝin donas al li, formas nur *praantikvan saĝon*, kiu en pli frua tempo estis tenata strikte en sekreto kaj kiun nur malofte vokitoj transdonis al aparte elektitaj homoj.

Temas pri *scio bazita sur sperto*, scio kiu estis elprovata dum *jarmiloj*, kaj neniu, kiu ĝin elprovis, iam estis trompata.

Kiuj nun transdonas ĝin, estis pretaj malkaŝi ĝin al la tuta homaro kaj preni sur sin la respondecon pri tio.

Tiu ĉi instruo pri la tera feliĉo estas kvazaŭ ĉeno en si fermita.

Sole en *vi* estas la forto por krei vian feliĉon, kaj ĉia feliĉo estas bazita sole sur la *potenco* de la kreanto, ĉar *nur* la *kontentigo*, kiun tiu potenco donas, estas vera feliĉo. — —

Vi havas la *devon uzi* la forton, kiu dormas en vi, — vi havas la devon krei al vi ĉi tie sur la

tero *vian plej altan feliçon*, kaj kiel vi povas *plenumi* vian devon, vi nun sciiĝos el tiu ĉi libro. —

## „MI“ KAJ „VI“

Vi sentas vin nur kiel „mi“, kaj vi povas enigi en vian „mion“ neniun alian krom vi.

Por vi mem, vi kiel „mio“ estas la centro de la mondo.

Por vi mem, vi kiel „mio“ estas *la „mio“ de la tuta homaro*. — —

Sed tiu „homaro“ estas *homogena tuto*, formita el miliardoj da „mioj“, el kiuj *ne eĉ unu* tute egalas vin, sed el kiuj ĉiu tamen estas, laŭ la *formo*, tute *identita* kun tio, kion vi sentas en vi kiel „mion“. — — —

Estas malfacile esprimi per homaj vortoj tion, kion mi tie ĉi volas diri al vi, kaj mi devas peti vin, ke vi *palpe eksentu* la finan sencon de mia parolo, ĉar mi tre bone scias, ke tie ĉi fina klarco ne plene povas esti donata per vortoj, kaj

ke mi povas paroli nur en *mia* lingvaĵo, kiun vi unue devas lerni „traduki“ en *vian*.

Mi deziras konsciigi al vi, ke vi estas *la unika centro de tuto*, kiu estas formita *nur* el unikaj „centroj“ kaj, ĉar ĝi estas io *senfina*, kvankam ne senlima, havas sian „centron“ en *ĉiu* loko...

Ĉiu centro estas *por si mem* „mi“ kaj ĉiu *alia* centro estas por ĝi „vi“. –

Se vi volas krei al vi *vian* centran feliĉon, vi devas atentadi tiun ĉi fakton kaj serĉi la sekretajn rilatojn, kiuj ekzistas inter „mi“ kaj „vi“.

Tiuj rilatoj konstante fluktuas kaj de momento al momento varias.

Neŝanĝebla restas nur la ĉiam reguligata ekvilibro de ĉiuj efikoj kaj kontraŭefikoj en la homara tuto.

Estante „*mio*“ vi povas nur *efiki* sur iun „*vion*“, – aŭ *senintence*, sen *voli* rezultigi efikon, aŭ *konsciavole*.

Kiam vi *volas* efiki sur iun „*vion*“, viaj rimedoj estas: *peto, persvado aŭ perforto*.

Sed vi sciu, ke por ĉiu sukceso de via agado, eĉ por la nura *intenco*, vi devas pagi difinitan, neŝanĝeblan *prezon!* — — —

Tial ne petu aŭ persvadu, se vi ne estas preta *lasi vin* peti aŭ persvadi de iu ajn „vi“, — eĉ malpli uzu *perforton*, se *vi mem* sentas ĉian perforton kiel *netolereblan devigon!* —

Nenio estos „donacata“ al vi, kiom ajn sekure ŝirmita vi eble sentas vin, kaj kiom ajn bone vualitaj vi opinias viajn verajn intencojn.

Vi certe povas kaŝi vin antaŭ individua „vi“, sed al la *tuta organismo de la homaro* ĉiam estas malkaŝita *ĉio*, kio okazas en vi, kaj kun *aŭtomata certeco* vi devos *porti la sekvojn* de via agmaniero en laŭleĝe difinita tempo, pli aŭ malpli frue. — — —

Se *vi mem* ne volonte lasas vin peti, kaj tamen petas; se *vi mem* estas nealirebla por persvado, kaj tamen celas persvadi; se *vi mem* ne ŝatas lasi vin perforti, kaj tamen uzas perforton, vi en ĉiu el tiuj okazoj atingas ion, pri kio vi kredas, ke vi ne bezonas pagi la prezon por ĝi, — sed *vi eraras.* —

Kontraste al homaj leĝoj, la leĝoj de la *spirito* ne povas esti *evite ĉirkaŭirataj*, aŭ *sofisme interpretataj favore al vi*. Kaj vi ne trovas advokaton, kiu provus gardi vin kontraŭ la *sekvoj* de via agmaniero. –

Vi devas *pagi senreste ĉion*, kio *fariĝis via ŝuldo al la homaro* per via konduto al *iu ajn* alia homo, kaj vi ne eskapos la leĝon, ĝis „*la lasta monero*“ estas pagita. – –

Ju pli longan pagoprokraston oni koncedas al vi, des pli gravan kaŭzon por maltrankviliĝo vi havas, ĉar interezoj kaj kunmetitaj interezoj neniam estos malŝuldigataj al vi...

Eĉ pli estas atentenda:

*Vi mem* povas fariĝi via kreditoro, ĉar *vi* respondecas al la homaro ankaŭ pri *via* persono, kaj vi *ne* postulu de vi ion, por kio vi *ne* povas atendi de la homaro *ekvivalenton*...

Alie vi devas pagi, pli aŭ malpli frue, kun kunmetitaj interezoj, ankaŭ *por vi* la prezon de via agado, same kiel por iu ajn aliulo. – – –

Ĉu vi aŭdas hodiaŭ unuafoje pri tiu leĝo, aŭ ĉu ties rigora konsekvenco kaj neŝanceblebleco eble klariĝas al vi la unuan fojon? –

Ĉu leviĝas en vi duboj pri viaj *antaŭaj agoj*, kvankam vi decidiĝis ekde *nun* saĝe konsideri vian agmanieron laŭ tiu leĝo? –

Se vi volas krei al vi vian feliĉon, vi sciu, ke vi *trovos* rimedojn kaj vojojn por pagi vian ŝuldon al la homaro en maniero *konvena al vi*, tuj kiam vi scias, *kiom* vi reale ankoraŭ *ŝuldas*.

Vi ne bezonas atendi, ĝis la leĝo prezentas al vi sian *postulon* kun senindulga indiferenteco kontraŭ viaj vivocirkonstancoj. –

Ellaboru al vi kompletan „konton“, kaj ne ektimu, se via „debeto“ treege superas vian „krediton“!

Kiom malindulge la tuthomara organismo *devas* „enkasigi“ de siaj individuaj membroj ĉiun ŝuldon, kies pagon oni intence „forĝesis“, tiom indiferece kaj aŭtomate ĝi *devas* ankaŭ sekvi *alian* leĝon, kiu *malebligas* al ĝi la uzon de ĉiu perforto, *malpermesas* al ĝi ĉiun tujan enkasigon, tuj kiam vi serioze starigis en vi la *volon* pagi vian ŝuldon, kaj tiom longe, dum vi

daŭre sentas vin *ŝuldanta*, – eĉ se la cirkonstancoj ankoraŭ ne permesas al vi pagi la *tutan ŝuldon* sen per tio ree alporti damaĝon al vi aŭ aliuloj.

Kiom mi tie ĉi diris al vi pri la leĝo de ekvilibriĝo en la tuthomara organismo, tiom vi *devos* scii, se vi volas krei al vi vian feliĉon.

Vi estas libera decidi, ĉu vi volas *plue* esplori la multajn debranĉiĝojn de tiu leĝo en la ĉiutaga vivo. – Tio certe ne malutilos vin.

Se vi volas fariĝi la kreanto de via feliĉo, vi baldaŭ ekkonos, ke eble la multege *pli granda* parto de la feliĉo alstrebata de vi estas plej intime enteksita en la rilatoj de via „*mi*“ al ĉiu „*vi*“.

Via feliĉo ankaŭ ampleksu la *amon* en ĉiuj ĝiaj formoj.

Sed la amo – kaj tie ĉi mi pensas ne nur pri „seksa kuniĝo“ – ĉiam bezonas „vion“, eĉ se tiu „*vi*“ estas *vi mem*.

Ankaŭ *ĉi tie* regas la leĝo de ekvilibriĝo, kaj vi ne devas atendi, ke via amo povus resti *libera*

*de desapontiĝo*, se vi kutimas „forgesi“ la *interŝanĝon* kaj volas *ricevi pli* ol kion vi *donas*.

Por ĉio, kion vi volas ricevi, vi devos doni *plenan ekvivalenton*, aŭ la tuthomara organismo iam *postulos* de vi tion, kion vi ankoraŭ ŝuldas, kaj vi ne plendu, se ĝi prenas al si sian rajton en maniero neŝancebla per viaj deziroj...

Ĉu temas pri via konduto kontraŭ *tute fremdaj personoj*, ĉu pri via amo kaj via amobezono en la rilatoj inter *virino kaj viro*, ĉu pri la *amo de gepatroj al siaj infanoj* aŭ de la *infanoj al siaj gepatroj*, ĉu pri la *amo inter gefratoj*, – neniam vi devas legitime atendi *pli*, ol kion vi *donas*, kaj se oni donas al vi *pli*, tiam zorgu, ke vi plej baldaŭ donu *rekompencan* por ĝi, se vi ne volas, ke oni *prenu* ĝin de vi iam, kiam vi malplej atendas tion, kaj en *maniero*, kiu eble malmulte plaĉos al vi. – – –

La *spiritaj* leĝoj efikas *ne alimaniere* ol la *fizikaj* leĝoj de la ekstera naturo, kaj se vi agas kontraŭ iu el tiuj ĉi leĝoj, vi scias laŭsperte, ke vi devas porti la sekvojn, ĉu tio plaĉas al vi aŭ ne.

Rilate al spiritaj leĝoj, estus same absurde atendi „*pardonon*“ aŭ *liberigon de la sekvoj*, kiel post iu ago kontraŭ *fizika* leĝo. – En ambaŭ okazoj vi postulus, ke *pro via erara ago* la kosma *ordo* suferu *perturbon*. – – –

Ĉar miliardoj da homoj ĉiutage faras tiajn erarojn, „*pardonado*“ tie ĉi signifus la sinkadon de ĉiuj spiritaj mondoj en *nokton de totala kaoso*...

Energie veku vin mem el la obtuza, malluma kredo de sovaĝulo, kiu kverelas kun sia idolo, se tiu ŝajne ne plenumas liajn dezirojn, kaj preferu kreu al vi kredon je la nemezurebla tuto, kies *parto* kaj *centro kiel parto* vi estas, por ke vi komprenu, *kiom malgranda vi aŭdacas imagi al vi Diecon*, kiu metu viajn malsaĝajn dezirojn super siajn enteksitajn ordojn, se ne plaĉas al vi porti la *sekvojn* de via maniero agi kiel parto de la tuto.

Se vi iam sukcesas atingi plej altan ekkonon, vi ne plu kapablos rememori sen plej profunda honto la tagojn, kiam ŝajnis al vi bazita sur Dia ordo la penso, ke „*filo de Dio*“ devas *sufери pro viaj agoj*, ĉar vi supozis, ke vi tiumaniere povas

oportune liberigi vin mem de la sekvoj de viaj agoj...

Vi tiam ne plu komprenos, ke vi ne prefere deziris plenan *memneniigon*, ol toleri dum nur unu momento la penson, ke senkulpulo *liberigu vin de kulpo per la suferado de turmentoj*. –

-----

Sed eĉ se vi apartenas al *tiuj*, kiuj opinias *sin mem* responsaj pri siaj agoj, mi tamen timas, ke vi eble ankoraŭ ne scias, ke vi estas responsa samamaniere pri ĉiuj viaj *pensoj*. – – –

Mi jam diris al vi, ke por la *tuthomara organismo*, kies parto vi estas, *ekzistas nenio kaŝita*, kaj eĉ viaj plej kaŝaj pensoj estas al ĝi senvualigitaj.

Sed tie ĉi mi ne deziras kaŭzi la eraron, ke mi instruas la ideon de „tuthomara animo“ kiel memstara, konscia estaĵo!

La tuthomara organismo estas *konscia* nur en siaj „centroj“, la individuaj homoj, kaj *en ĉiu individuo* ĝi estas konscia de si mem *alimaniere*, kaj en jen *pli*, jen *malpli* alta grado.

Dirante, ke „nenio iam estas kaŝita al la tuthomara organismo“, mi volas komprenigi al vi

nur, ke ĉio, kion vi pensas aŭ faras, efikas *ne nur sur vin mem kiel personon*, sed kun aŭtomata certeco *sur la tutan spiritan organismon de la homaro* kaj tie estigas siajn *sekvojn*. Poste vi ofte serĉas vane la *kaŭzojn* de tiuj sekvoj, ĉar neniam venis al vi en la kapon, ke eĉ viaj plej mallaŭtaj pensoj, kiujn vi opiniis kaŝitaj preskaŭ *antaŭ vi mem*, povus fariĝi la *kaŭzo* de sekvoj etendiĝantaj tiom foren. — — — —

Se vi volas fariĝi la kreanto de via *feliĉo*, vi devas scii, ke viaj *pensoj fidele servas* al vi kiel obeemaj tirbestoj, se vi *edukis* ilin por tiu servado; sed ke ili furiozas kiel *sovaĝaj bestoj*, kiam ili, de kutimiĝinte de servado, estas *mal-katenataj* de vi por libere kuregi kontraŭ la homaron. —

Vi ne povas esti vere feliĉa, se vi ne kreas al aliuloj, kiom dependas *de vi, eblojn por esti feliĉaj*, sed vi *neniigas* la feliĉon de aliuloj, se viaj pensoj enrompas, kvazaŭ sovaĝaj taŭroj, en la animajn florigardenojn de aliaj homoj...

Se vi pensas en *harmonioj*, vi sonigos harmoniojn en *aliuloj*, sed se vi pensas *pereon kaj*

*kaoson*, vi estigos pereon kaj kaoson ankaŭ en aliuloj. — — — — —

Vi ne povas konservi vian sanon sen ĉiam firme teni en vi pensojn pri *sano*, *beleco* kaj *forto*, kaj vi efikos sur aliulojn per viaj pensoj kiel *fokuso de epidemio*, se vi, anime fosante en viaj korpaj difektaĵoj, povas pensi nenion alian ol malsanon kaj malbonfarton.

Mi konas personon, kiun la kuracistoj deklaris „*nekuracebla*“ kaj kies malsano estis de speco, kiun eĉ *hodiaŭ neniu kuracisto povas kuraci*, – sed li *kuracis sin mem* per la fortoj de siaj pensoj, kaj post jardekoj li ankoraŭ vivas kiel sana homo.

Mi konas alian homon, al kiu oni malkaŝis laŭ lia insista peto, ke en la *plej favora okazo lia vivo daŭros ankoraŭ kvar ĝis kvin jarojn*; – li prenis *neniun* el la preskribitaj medikamentoj, uzis *neniun* sanatorian kuracmetodon, kaj decidis konservi sian vivon *sole per siaj pensofortoj*. Estas pasintaj preskaŭ dudek jaroj, post kiam oni rigardis lin kiel nekuraceblan, kaj li vivas sen iu malsaniĝemo, kun freŝa kaj aktiva

forto, kaj hodiaŭ ŝajnas al li sonĝo, ke li iam bezonis kuraciston. — — —

Tiaj homoj efikas sur sian vastan ĉirkaŭaĵon kiel *centroj radiantaj sanon*, eĉ se ili laŭ strikte medicina vidpunkto ne povas esti rigardataj kiel fakte „kuracitaj“.

Ili *sentas* sin kuracitaj, kaj la tempo pravigas ilin, ĉar iliaj suferoj malaperis.

La *certeco*, kiun la *sukceso* donis al ili, plue donas al iliaj pensoj nerezisteblan *potencon*, tiel ke ili nun kapablas efiki malproksimen kiel *portantoj de sano*. — —

Se vi ĉiam pensas pri malriĉeco kaj mizero, malriĉeco kaj mizero baldaŭ venos, — se vi ĉiam timas iun ajn fatalaĵon, la fatalo kun plena certeco sekvos viajn paŝojn.

Sed se en la plej malluma horo vi ankoraŭ rigardas vian aferon *kiel ne perditan*, ĝi *neniam* estos perdita al vi; — vi certe baldaŭ trovos elirejon.

Rigardu fatalaĵon, kiu renkontas vin, ne alimaniere ol fulmotondron, kiu surprizis vin dum

ekskurso, kaj vi povas esti certa, ke *pli kaj pli malofte* fatalaĵo renkontos vin.

*Vi mem estas la magneto por via bona aŭ malbona sorto!*

Vi povas „agordi“ vin por la fortoj, kiujn vi *volas* altiri, kaj ili devas *sekvi* vin.

Sed vi agas ne nur kiel „*mi*“ *por vi mem*, sed *samtempe* por ĉiu „*vi*“, kiu estas spirite ligita kun vi en la tuthomara organismo. — —

La *forto* de la efiko deiranta de vi dependos multe malpli ol vi pensas de *eksteraj distancoj*; anstataŭe, ĉiuj gradoj de tiu forto estas difinitaj *de la pli aŭ malpli granda simileco de viaj propraj vibroj al tiuj de aliaj homoj*. — Sed ĉiu el la miliardoj da homoj, kiujn vi sentas kiel „*viojn*“, estos *iumaniere ankoraŭ atingata* de la *finaj osciloj* de la efiko estigata de vi.

Tial vi portas *grandegan* respondecon. — — —

Vi *neniam* estas *sola*, eĉ se vi kredas, ke malantaŭ la plej dikaj muroj vi estas kaŝita...

Vi ĉiam agas, kiel „*mi*“, *en rilato kaj ligiteco kun ĉiu „vi“*, ĉar kvankam vi estas *unika „mi“*,

tamen ekzistas *plena identeco* de ĉiuj „centroj“ de la *homara tuto*...

## AMO

Ne eblas paroli pri la *feliĉo*, sen mencii la *feliĉon*, kiun homo kaj homo povas konstrui al si en la *amo*.

Sed tro facile oni forgesas ankaŭ tie ĉi, ke tiu *amofeliĉo*, kiel ĉiu *feliĉo*, devas esti *kreata*. — —

Tre multaj homoj pasigas sian vivon ĉiam *atendante* iun ajn venontan „*feliĉon*“, kaj multaj inter ili alstrebas *neniun alian feliĉon* ol la *feliĉon de amo* inter viro kaj virino.

Kelkaj atendas *vane* dum sia tuta vivo, ĉar la *feliĉo* revata de ili ne lasas *trovi* sin sur ilia *vivo*vojo.

Aliaj iam *kredas* esti *trovintaj* sian *amofeliĉon*, sed post mallonga tempo okazas „*elreviĝo*“, kaj ili malesperas pri la *eblo atingi daŭran amofeliĉon*.

Malsaĝaj paroloj pri „la batalado inter la seksoj“ resonas en iliaj oreloj, kompletigante la malfeliĉegon...

Sed reale tiuj „elrevigitoj“ estas ankoraŭ ne vere elrevigitaj, liberaj de trompaj revoj, – sed subfalas al *nova* trompiĝo. – – –

Komence ili kredis, ke la feliĉo de amo estas donaco de la „hazardo“; ke ĝi devas esti trovebla kaj konservebla *sen* ilia kunago.

Nun ili *ŝajne* estas liberaj de *tiu* trompiĝo, sed *nur* rilate al *sia reciproka elekto*, – kaj tiel ili tuj subfalas al *tiu nova* trompiĝo, kredante, ke la tuta *malfeliĉo* estas la sekvo nur de ilia erara *elektado*. – –

Ho ne, vi, kiuj opinias vin trompitaj pri via amofeliĉo, – *via unua impulso*, kiu kondukis vin *unu al la alia*, en la *plej multaj okazoj* ne trompis vin, sed *vi* nun trompas vin *mem*, ĉar vi ne povas liberigi vin de la erara supozo, ke ĉiu *amofeliĉo* devas esti trovebla *sen via kunago*...

Vi ankoraŭ ne *scias*, ke vi devas *krei* vian feliĉon, se ĝi fariĝu al vi *daŭra posedaĵo*, *neperdebla riĉaĵo de via vivo*. –

Via *volo* vere atingi vian *feliĉon* ankoraŭ ne estis *pura*.

La *deziro* trovi plenan amofeliĉon *certe* ekzistis en vi, sed „deziroj“ neniam havas *ordonan potencon*, kaj vian volon, kiu *sola povus* krei vian feliĉon, vi *dissplitigis* en mil malgrandajn strebojn, anstataŭ *koncentri* ĝin sur la *unu celon*: *krei vian feliĉon*. — — —

Kiu ajn *volas*, kaj ne nur „deziras“, trovi sian feliĉon en la amo, tiu devas voli *nur* sian feliĉon kaj *nenion apud ĝi*.

Li ne devas jam antaŭe opinii *sekurigita* tion, kion li unue devas *krei*, — ne devas kiel revanto *ĝui* fruktojn antaŭ ties *maturiĝo*, fruktojn, kiujn montras al li nur *lia revo*, kaj kies foreston li devas dolore senti, kiam subita pordofrapo de la realo vekas lin el la sonĝo. — —

Ekde la unua tago de sia amo li devas *disvolvi* en si la *volon* al feliĉo, kaj devas subordigi al ĝi *ĉion*, kio estas la celo kaj sopiro nur de liaj *deziroj*. — — —

La *feliĉo* de la amo estas konkerebla nur, se oni kun vera obstino *volas* fariĝi daŭre feliĉa kun la homo, kiun oni amas. –

Oni *ne plu* devas *eĉ dum unu sekundo* lasi sian fantazion „ludi“ ĉirkaŭ la penso, ke *povus* „okazi *io alia*“.

„Feliĉo de amo“ estas – kiel ĉiu *alia* feliĉo – feliĉo de la *kreanto*, estas la kontentiĝo rezultanta el bone farita *verko*, estas „verko“ kaj *potenco* verki...

La verko de *amo* ĉiam volas vidi la amatan homon *feliĉigita* de ni, kaj la *kontentiĝon* pri tio, ke *ni povas* feliĉigi lin, ni sentas kiel nian *propran* feliĉon. –

Sed kiu havas en si la *potencon feliĉigi* alian homon, tiu ankaŭ havas la potencon *profunde malfeliĉigi* lin. –

Se *firma volo* ne ĉiutage denove direktas sian atenton al la celo, uzi la propran potencon *nur* por *feliĉigi* la amatan homon, tiu potenco fariĝas sklavo de demonaro: la aro de mil grandaj kaj malgrandaj *deziroj*, kiujn la ĉiutaga vivo estigas en ĉiuhore variantaj formoj...

Tiam via *amo*, se ĝi estas vera, malgraŭ ĉiam nova sufero eble restas *viva*, sed la *feliĉo* de amo, kiun vi jam opiniis *posedi* dum semajnoj de ama ebrieco kaj revado, baldaŭ *forlasos* vin, anstataŭ fariĝi via *daŭra posedaĵo*. — — —

Ĉiu el vi du demandos la alian: „Kio estas la kaŭzo de tio, ke ni *ne* povas *kompreni* nin reciproke, ke ree kaj ree unu kaŭzas al la alia profunde malfeliĉajn tagojn, kvankam, *malgraŭ* ĉiu reciproka turmento, nia koro diras al ni, ke ni *tamen* vere *amas* nin unu la alian?!“ —

Sed vi *neniam* trovos la solan savan *respon-*  
*don*; en bonaj horoj vi konkludos *novajn kaj*  
*novajn paktojn*, kaj baldaŭ poste *rompos* ilin; vi  
*disfrotos* vin unu je la alia, kaj — favoraokaze —  
fine kondukos tolereblan vivon unu apud la alia  
en *rezignacio*, konvinkite, ke vi ambaŭ estas nur  
*viktimoj de kruela sorto*...

Tamen: en la plej multaj okazoj ĉio ĉi estas  
nur *trompiĝo*, estas la sekvo de *iluziado*, kiu *re-*  
*vas* pri feliĉo kaj dezirante *esperas* ĝin laŭ la  
bildo de siaj revoj, anstataŭ *voli* kaj *kun firma*  
*volo krei* ĝin. —

*Eĉ hodiaŭ la feliĉo de amo ne estas perdita por vi du, se ankoraŭ fajrereto da vera amo ardas en via profundo, kaj se vi ne rifuzas akcepti la ekkonon, ke vi ne trovis vian feliĉon de amo nur tial, ke vi opiniis ĝin trovebla sen mem krei ĝin, – ke vi volis rikolti sen semado. – – –*

*Eĉ hodiaŭ vi povas eklerni vere vivi la vivon de amo, povas vekti vin el la revo, kiu kondukis vin al malfeliĉo kaj al rezignacioplena rezigno.*

Vi eble havos ion por *pardoni* al vi reciproke, kio estas malfacile pardonebla, kaj iu aŭ alia malbona vorto ne estos facile forigebla el viaj animoj, sed se iam, eĉ nur dum *horoj*, unuigis vin vera *amo*, tiam vi baldaŭ vidos tute klare, ke vi falis en *memtrompon* kaj ke ĉio, kion vi havos por *pardoni* al vi, estis ĵetita de vi du nur kontraŭ *fantomo*, kiun vi amarigite formis el vi mem, kaj je kiu vi *kredis* kaj eble ankoraŭ kredas, ĉar la fantomo fariĝis al la iam amita homo *modelo* por *fakte formi sin laŭ ĝi...*

Antaŭ ĉio, vi nun devas *voli* vidi unu la alian *alimaniere*, se via amo *saniĝu*, se vi volas krei la *feliĉon* de via amo en *vera* „elrevigiteco“, do: estante *liberaj* de trompaj revoj!

Eble ne estos facile al vi, komence venki la konstantan *suspektemon*, kiu efektive penas esplori, ĉu la homo iam amita, kaj nun eble jam longe preskaŭ malamata, *ankoraŭ* portas la bildon de la *fantomo* en sia koro...

Sed se, *malgraŭ* ĉiuj komencaj refaloj, vi ĉiutage kaj ĉiuhore renovigas la obstinan *volon*, uzi la potencon, kiun vi havas super vin reciproke, nur por vere *feliĉigi* la alian, tiam vi baldaŭ lernos *krei* vian feliĉon. – –

Eble vi nun diras: „Sed kion utilas al mi, se *mi mem* havas la plej bonan volon konduki nin al feliĉo, sed se mia kunulo *ne* havas la saman volon? –“

Tiom longe, kiom vi povas *tiel* demandi, vi ankoraŭ *ne komprenis*, kion signifas: *krei* sian feliĉon.

Vi ankoraŭ deziras esti *dependa* de io ekstera, kaj ankoraŭ ne kuraĝas stari sur viaj propraj piedoj.

Vi ankoraŭ ne fidas *vin mem* kaj ne vere volas *uzi vian volon*. –

Tuj kiam vi vere *volas* krei vian *amofeliĉon*, ne devas ĝeni vin, ĉu la amata homo renkontas viajn dezirojn *favore*, aŭ *kontraŭas* ilin.

Viajn *proprajn* dezirojn vi devas plene *kvietigi*, por ke ili ne plu povu ĝeni vian volon!

Vi devas voli *nenion alian* ol la *sukceson* de via *potenco feliĉigi* la amatan homon. –

*Ĝuante la sukceson* vi *mem* fariĝos feliĉa.

Tie ĉi oni devas lerni *memregadon*, por konduki *sin mem* al *sukceso*. – – –

Vi devos lerni *kontraŭbatali inklinojn*, *bridi* ekbolantajn *afekciojn*, *subpremi* ĉiuhore aperantajn *dezirojn*, – sed ĉio ĉi fariĝos al vi fonto de *memĝuado*, ĉar vi sentos, kian *feliĉon* vi kreas al vi *nur per tio*, ke vi fariĝas *mastro de vi mem*; ĉar eble vi hodiaŭ eĉ ne povas *imagi*, *kiom firme* vi ankoraŭ kuŝas en la *sklavokatenoj* de ĉio *tio*, kio *ne* estas vi *mem*...

Eble vi ankoraŭ lasas vin *eksciti*, kiam vi vidas, ke la amata homo rigardas aferon, kiun vi *ekkonas ĝuste*, en tute *malĝusta* maniero, – kiam vi vidas, ke li *preferas* aferojn, kiujn vi *abomenas*, kaj ke lia „gusto“ igas *ami* lin ion, kio ŝajnas al vi preskaŭ „netolereble malkonforma al la bona gusto“. –

Sed kion signifas *ĉiuj* tiuj aferoj kompare kun la feliĉo de *amo*?!

Kiom ridinde *malgrava* estas ĉio ĉi kompare kun la *feliĉo*, kiun du *amantoj* povas *doni* al si reciproke!

Kiu el vi du „pravas“ aŭ „malpravas“ en tiuj aferoj, *estas tute ne konsiderinde*, kiam temas pri la kreado de la *feliĉo de amo*!

Estas nur plej malbona avido al *substituaĵo* de potenco, se vi ĉiam insistas, ke la homo amata de vi rigardu *vian* opinion pri afero kiel *sian*, indiferente, ĉu vi estas *vere* „prava“, aŭ, kontraŭe al via *konvinko*, tute „malprava“. –

Kiam vi vidas, ke via potenco *feliĉigi* la amatan homon estas *sukcesa*, vi ankaŭ vidas kun

miro, kiel viaj – pli frue tiom *kontraŭaj* – manieroj vidi la aferojn subite *unuigâs*. – – –

Tiam vi hontante devos konfesi al vi, ke via tuta kverelado pri vantaj aferoj, kiuj ŝajnis al vi tiom „gravaj“, estis nura *malsaĝaĵo*.

Vi tiam ekkonos, ke vi vane penis unuigi viajn „*opiniojn*“, dum vi *mem* ankoraŭ ne estis unuigitaj. – –

La feliĉo de la amo devas esti *kreata*, antaŭ ol ĝi povas formi el vi du la „*unuecon de du*“, kiu ne estas detruenda de iu apartigo, kaj kiu *unuigas* vin en ĉiu pensado kaj sentado. – – –

Ankaŭ en via *amo*, – mia amiko, mia amikino, – vi havas la *devon* esti *feliĉa*, kaj via tuta „*malfeliĉo*“ estas nur *malobservo* de devo! – –

## RIĈECO KAJ MALRIĈECO

Ĉiu vivo en la kosmo estas la efiko de *polusaj kontraŭoj*, estas la interŝanĝo inter poluse kontraŭaj fortoj.

Kiu deziras *neniigi* la riĉecon por *helpi* la malriĉecon, tiu ankoraŭ ne ekkonis, ke ankaŭ *malriĉeco* kaj *riĉeco* bezonas sin reciproke, same kiel *ĉiu* poluso bezonas sian *kontraŭpoluson*.

Nur kiam la du polusoj restas en *plena kontraŭeco*, *vivo* formiĝas kaj la verko de la homo prosperas. — —

La *ĉesigo* de polusaj kontraŭoj rezultigas *neniigon* kaj *pereon*.

Kiu volas *vere* helpi al la malriĉeco, tiu devas *voli la ekziston de la riĉeco*, kvankam malriĉeco kaj riĉeco tute ne devas ĉiam plu kaj plu montri la krudajn, brutalajn *formojn*, en kiuj solaj ili ĝis nun estas konataj al la homaro. — —

„*Malriĉuloj estas feliĉaj*“, sed malriĉeco ne nepre devas esti *manko kaj mizero*...

*Riĉeco povas estigi nemezureblan benon*, sed ĝi ne devas ruliĝadi sata kaj sen kreemo sur la malalta ŝtupo, pri kiu la majstro el Nazareto diris, ke „estas pli facile por kamelo iri tra trueton de kudrilo, ol por riĉulo eniri en la regnon de Dio“...

Miljara eraro kredis, ke la materiaj aferoj de tiu ĉi tero estas tiom *limigitaj* kaj *neplimultigeblaj*, ke estas neeble, ke *ĉiuj* homoj povus vivi *sen manko*, kaj tiel estiĝis ideo pri „riĉeco“, kiu devis amarigi ĉiujn homojn, kiuj suferas mankon.

Oni estus veninta pli proksimen al la *vero*, se oni estus ekkoninta, ke estas neniom *pardoneble*, se eĉ nur *unu* el tiuj vivantaj sur la tero devas suferi *mankon*, sed ke la *riĉeco* de la aliaj *tute ne* estas la *kaŭzo* de tiu manko. — — —

Estas absoluta *devo* de la homaro zorgi pri tio, ke *neniu* el ĝiaj membroj suferas *mankon*, ke *ĉiu* homo, *kio ajn li estas* kaj *kiel ajn oni eble taksas lian valoron*, ricevas nutraĵon, vestaĵon kaj rifuĝejon, kaj tiu ĉi devo estas neŝanĝebla, eĉ se temas pri homo, kiu *neniel alportas utilon*.

Se li kaŭzas *damaĝon*, oni povas *izoli* lin, sed oni ne rajtas iam lasi lin suferi *mankon* je tio necesa por kontentigi liajn bezonojn. Oni ankaŭ ne havas la rajton rifuzi al li la *valorojn*, kiujn bezonas lia *spirito* por, se ĝi tion sopiras, levi sin el sia profundo.

Ĉio, kion oni ankoraŭ nuntempe nomas „punado de la krimulo“, estas malbona entrepreno, ĉar ĝi ne baziĝas sur la ekkono, ke la homaro estas *plej intime interligita* en sia tuthomara organismo, kaj ke *ankaŭ la tuta homaro devas esti kulpa* pri la ago de la krimulo, se ĝi fariĝis *ebla*.

Tie ĉi, *pli alta ekkono* iam agos multe *pli benoplene* per tio, ke ĝi *malebligas krimojn*, dum oni eĉ *hodiaŭ* rigardas krimojn kiel preskaŭ *naturan, neeviteblan aferon*, kaj celas nur „*puni*“ la krimulon. — — —

Sed aparte de „krimuloj“, ĉiutempe ekzistos homoj, kies utilo por la tera bonstateco de la homaro estas apenaŭ ekkonebla kaj kiujn oni tamen devas konservi *liberaj de manko*, se la homaro ne volas malutili sin mem *en sia tuteco*.

Sufiĉu tio, kion mi ĝis nun diris pri la *manko*, kiun la homaro devas provi *forigi*, se ĝi ne volas *mem* suferi damaĝon je sia *tuthomara organismo* kaj per tio *kaŭzi ĉiam novan damaĝon*.

Sed ĝi neniam devas provi forigi *riĉecon kaj malriĉecon*, se ĝi ne volas *forigi sin mem*. — — —

Malriĉeco kaj riĉeco estas du polusoj, kiuj rezultigas la *vivon de la homaro*, — kiuj tenas la tuthomaran organismon en la *fortotensio*, en kiu sola ĝi povas *plenumi sian kosman taskon*.

Ve al la homaro, se ĝi ne plu povas *alte respekti la riĉecon!*

Ve al la homaro, se ĝi ne plu kliniĝas *kun profunda respekto* antaŭ la *malriĉeco!*

Inda je ĉiu honoro estas la *malriĉulo*, kiu portas sian malriĉecon kun digno, kaj ne malpli honorinda estas ĉiu riĉulo, kiu portas, estante konscia pri sia respondeco, la ŝarĝon de sia riĉeco kiel *pruntedonon de la homaro!*

Ĉiu *sin gardu*, ke li ne *malestimu* la alian, kaj riĉulo kaj malriĉulo sciu, ke ili *ambaŭ* havas la *saman valoron* por la *tuto!*

Sed estas *eraro* supozi, ke la malriĉeco, kiun la homaro *same bezonas* kiel la riĉecon, devu ĉiam esti proksima al *manko* por esti la *kontraŭpoluso* de la riĉeco.

Riĉeco kaj malriĉeco estas tre relativaj nocioj.

Ju pli *alten* la *riĉeco* sin levas, des pli *alten leviĝas* la limo de *malriĉeco*, kaj povas ekzisti kompare kun alta riĉeco speco de „malriĉeco“, kiu, en la sfero de malriĉuloj, estas rigardebla kiel „riĉeco“.

Vi, kiel parto kaj „centro“ de la homara tuto, ĉiam havas la *rajton* strebi al *ĉiu* riĉo, kiun la tero *povas* prezenti al vi.

Kiom de tio vi povas *akiri*, dependos de via *karmo*, de via *kapablo mastri vian sorton*. –

Sed vi ĉiam *strebu* al la plej alta relativa „riĉeco“, kiu laŭ homa prijuĝo ŝajnas al vi noblmaniere *atingebla!*

Vi ne devas pensi, ke tio iam signifus malgajnon por la kontraŭpoluso de la *malriĉuloj*.

Eĉ se troviĝus sur la tero la *milobla* nombro da riĉuloj, *neniam* mankus *malriĉuloj*, – kaj eĉ se *ĉiuj* homoj de tiu ĉi tero fariĝus *riĉaj*, tamen ekzistus tia *diverseco* de tipoj de riĉeco, ke ankaŭ tiam la du polusoj konserviĝus.

La tero estas tiom *senlime* riĉa je riĉaĵoj, ke tiu stato estus *ebla*, sed en *nia* tempo ĝi estas

neprobabla, ĉar ĝis nun la plej multaj homoj ne *konas* la *spiritajn leĝojn*, laŭ kiuj la tero donas siajn trezorojn, kaj eĉ se ili diskoniĝus, nur malmultaj homoj estus pretaj plenumi *leĝojn* tie, kie ili kontraŭleĝe postulas *donacon*. — —

Same *tie ĉi* regas, antaŭ ĉio alia, la leĝo de *interŝanĝo* aŭ de *ekvilibrigo*, kaj vi *neniam* povos *ricevi* kaj *daŭre posedi* ion, por kio vi ne donas *la plenan prezon*, — por kio vi ne pretas *pagi plenan ekvivalenton*. — —

Eble hodiaŭ kaj morgaŭ io povas fariĝi via propraĵo *sen* pago, kaj vi kredos, ke vi nun *daŭre* posedos ĝin, sed tro baldaŭ vi ĝin *perdos*, kiom ajn forte vi penas konservi ĝin en via posedo. —

Tie ĉi regas la plej rigoraj *spiritaj* leĝoj, kiuj estas nerompeblaj same kiel la leĝoj, al kiuj en la ekstera mondo obeas la *fizikaj* fortoj.

Vi havas *rajton je ĉiu riĉeco*, sed se vi volas *atingi* iun ŝtupon de riĉeco kiom ajn modestan, vi devos esti preta doni *ekvivalentojn* por ĝi. — —

Vi diros al mi, ke vi konas ankaŭ riĉulojn, kiuj ricevis sian riĉon *de siaj patroj*, sed tio ne niel kontraŭas la menciitan leĝon.

*Certe* estis pagataj la *ekvivalentoj*, kaj se la heredinto ne zorgas pri konstanta, plua *ekvilibro*, li iun tagon certe *perdos* la posedaĵon, kiun aliuloj kreis por li.

Tio povas daŭri tre longan tempon kaj trafi nur la postajn heredantojn, ĉar la spiritaj leĝoj efikas ĉiam laŭ la *impulso*, kiu iam celis plenumi ilin.

*Rapide kaj avide amasigita* propraĵo estos simile rapide *malaperinta*, se ĝi ne estas protektata per *novaj* impulsoj, kaj *malfacile* akirita havaĵo konserviĝos *longe*, eĉ se la heredintoj ne estas indaj je ĝi.

Ne pensu, ke tie ĉi temas pri iu „maljustaĵo“!

Kaj certe nenio estas prenata *for de vi*.

Vi estas ĉiam *libera* akiri, kion vi *povas* akiri, kaj vi *povas* akiri, kion vi vere *volas* akiri. –

Ne devas ĝeni vin, ke *aliuloj posedas* multon sen *mem* esti akirinta ĝin.

La riĉaĵoj, kiujn la tero havas, estas tiom *nemzureble* grandaj, ke ĉiutempe restas *ankaŭ por vi la plej giganta riĉo*. — — —

Sed ne konfuzu viajn *dezirojn* kun *via volo!*

Viaj *deziroj* atingos ion *nur*, se ili sukcesas persvadi vian *volon*, ke ĝi sin direktu laŭdezire.

La homoj de granda *volo* kreis preskaŭ *nemzureblajn* riĉaĵojn, kvankam ili devis *komen-ci* en plej profunda *malriĉeco*, — sed la homojn de granda *dezirado* vi povas trovi sur ĉiuj *stratoj*, kaj vi malofte renkontos iun, kiu fine povis realigi *iometon* de siaj *deziroj* per sia *volo*...

Sed se vi *volas* krei la riĉon al vi atingeblan, tiam gardu vin kontraŭ *envio!* — —

Se vi *volas mem* fariĝi „riĉulo“, eĉ se vi *sopiras* nur la riĉecon de riĉa *malriĉulo*, vi devas *vidi* en *ĉiu riĉulo*, kiun vi renkontas, *promeson* kiu garantias al vi la finan *atingon* de via celo.

Vi devas lerni *ĝoji* pri tio, ke riĉuloj *ekzistas*, kaj vi devas rigardi ilian riĉecon kvazaŭ kiel *antaŭkondiĉon* por la plenumiĝo de via volo.

Se vi *volas* fariĝi „riĉa“, tiam ankaŭ gardu vin kontraŭ bagatelema „*ŝparado*“! — —

Certe, vi trovos sufiĉe da riĉuloj *ekstreme* „ŝparemaj“, sed vi serĉus vane, se vi volus montri al mi veran „riĉulon“, kiu *akiris* sian riĉaĵon *nur* per „ŝparemo“. — — —

Se vi volas fariĝi „riĉa“, kredante, ke „riĉeco“ estas nepre necesa por via surtera feliĉo, tiam esploru vin ekzakte, por ke vi trovu la *ekvivalentojn*, per kiuj vi intencas *pagi* vian esperatan riĉecon!

Sur tiu ĉi tero kaj en la eterneco, *neniam* io estos *donacata* al vi, kaj se vi tie ĉi iam devas *akcepti donacojn*, eĉ se temas nur pri konvenciaj donacoj kutime farataj je certaj festotagoj, tiam tuj demandu vin, kiel vi povas *pagi* tiujn donacojn al la *homara tuto*, alie vi *devos* pagi ilin tie, kie vi tion tute ne *volas*...

Vi vidas, ke estas *ne tute facile* plenumi ĉiujn *kondiĉojn*, kiujn oni *metas* al vi, se vi volas iam *atingi* „riĉecon“ eĉ de *plej modesta* grado. — —

Sed kreu al mi: — *ĉiuj*, kiuj iam atingis riĉecon, *ne* atingis ĝin *en alia maniero*, eĉ se *ili mem* ne povis *klarigi* al si la kaŭzojn.

Konstante okazas interŝanĝo de varoj sur la tero.

Nenio estas atingebla kaj daŭre *posedebla*, se vi *rifuzas* tion, kion vi povas *doni kompanse* en la formo de *aliaj valoroj*. –

Sed se vi havas nenion por *doni*, tiam vi juste ne povas *atendi* ion.

Vi ne akiros *pli ol tion*, kio *konformas al la pagita prezo*. – – –

Ne fordonu vin al trompiĝoj!

Tie ĉi regas *senindulgaj* leĝoj, kaj vi povas atingi „riĉecon“ *nur* per la *donado* de iuj *valoroj kuŝantaj en vi*.

## LA MONO

La plej multaj homoj de „idealisma“ pensmaniero teruriĝos, se en traktaĵoj pri altaj *spiritaj valoroj* subite estas parolate pri la *mono*.

Ili ne scias, ke ankaŭ *la mono obeas spiritajn leĝojn* kaj *estas esprimformo de spiritaj rilatoj*.

Ili preferus *tute ne okupiĝi* pri mono kaj monaj aferoj, kaj mi tion bone komprenas, ĉar ankaŭ por mi ĉiuj „monaj negocoj“ estas plej malagrablaj necesaĵoj de la surtera vivo.

Sed tie ĉi nur la *formo* kreas antipation, dum la *afero mem* konformas al plej alta spiriteco. –

Neniu homo informiĝanta pri la *kurzoj de la borso* ekpensos, ke *tie ĉi* leĝoj de la spirito, kiu animas la tutan materion, trovas sian *plene konforman esprimon*. – –

La plejmulto de la pli subtilaj animoj rigardas „monon“ kiel aferon tute „malpuran“, trivitan de multaj manoj, kaj ili tuŝas ĉion, kio havas rilaton al mono, nur per la fingropintoj, kaj eĉ tiam kun *abomeno*. –

Tamen mono estas *io sankta*, kaj mi kuraĝas diri tion, kvankam mi scias, ke tiu aŭ alia stranga sanktulo nun opinias, ke mi fariĝis granda blasfemanto. – – –

Mi ne povas helpi al tiaj noblaj revantoj, kaj mi eĉ suspektas, ke eble estas inter ili kelkaj, al kiuj mono estas ne „*io sankta*“, sed *io akirenda per ĉiuj rimedoj*...

Mono esprimas nur la *valoron*, kiun *io spirita* povas *konkeri* en la *materia* mondo.

Ankaŭ *posedaĵo* kaj *propraĵo* finfine estas *spiritaj valoroj*, ĉar *ne ekzistas* iu *posedaĵo* aŭ *propraĵo*, pri kiu oni ne povus aserti, ke ĝi iu maniere ŝuldas sian *originon* al *spiritaj valoroj*.

Sed se vi, kiu legas tiun ĉi „libron pri la feliĉo“, vere volas en la nuna tempo krei vian *feliĉon*, vi apenaŭ povos malatente preteriri la monon. —

Vi devos ekkoni, ke mono ne estas la „malpuraĵo“, kiel kiun oni kutimis suspektigi ĝin al vi, kaj vi devos lerni paroli pri mono kun iom da *solena respekto*, se vi volas vere ekkapti ĝian *valoron*. —

Mi refoje ripetas: mono estas *io sankta*, ĉar ĝi esprimas la *valoron*, kiun *io ajn de spirita signifo* povis havigi al si en la mondo de *materio*.

Sed al la plej multaj homoj mono ekzistas nur por „pagado“, kaj ili ne suspektas, ke sur tiu ĉi tero oni *povas*, kaj plej ofte *devas*, pagi per *aliaj valoroj*. — — —

La taŭgeco de la mono *kiel esprimo de pli altaj spiritaj valoroj* estas *fremda* al ili, kaj se oni parolas pri mono kiel „esprimo de spiritaj valoroj“, ili rigardas tion kiel profanadon.

Tamen ne ekzistas pli klara pruvo de la efiko de spiritaj valoroj en tiu ĉi materia mondo ol tiu, kiu estas indikebla per mono kaj mona valoro.

Ĉiuj altaj spiritaj valoroj, kiuj iam aperis sur tiu ĉi tero, en plej diversa maniero movis *monon kaj monan valoron*.

Se *spiritaj valoroj* volas havigi al si *influon* sur tiu ĉi tero, ili devas kvazaŭ *kunligi* sin kun la materio, devas *mem* fariĝi „materia“, por *movi materion*.

Krome, aliamaniere ili eĉ ne povas informi la materian mondon pri sia *ekzisto*.

Spirita valoro – kiom ajn alta – kiu ne sukcesas *ekmovi la ĝenerale validan esprimformon de materiaj valoroj, la monon*, fariĝas nek *ekkaptebla* nek *uzebla* por la homaro.

Ju pli grandaj la sumoj ekmovataj de iu spirita valoro, des pli firme ĝi ankriĝos tie ĉi en la materia mondo. – –

El tio vi povas tiri instruon.

Vi ne devas iam atendi, ke per via tuta „idealismo“ vi povos doni ion bonan al la homaro,

kaj ke vi kondukos ĝin al venko, dum vi ankorau *malestimas* monon kaj monan valoron. — —

Certe, vi ne „genuu antaŭ la idolo Mamono“, strebante al posedo de mono kiel *fina celo*. Anstataŭe, via agado celu nur la *movadon* de l' mono; ĝi havigu al vi malpli la *posedon*, ol la *eblon* „*ruligi*“ pli kaj pli grandajn sumojn en la servo de spiritaj valoroj. — —

Kiom ajn malmulte da mono vi posedas, vi tamen konsciu la *forton*, kiu kuŝas *en ĉiu mone-ro* kaj, simile al ŝtoneto povanta kaŭzi lavangon, *kapablas ekmovi plej grandajn sumojn*. — —

Kaj vi devas ankaŭ *fidi* la movantan forton malantaŭ la mono.

Tiu magia forto reagis tre sentive al ĉiu *man-ko* de fido, same kiel ĝi, inverse, neniam trompas *neskueblan fidon*, kiu estas kunigita kun *pacienco*.

Ju pli multe da mono vi povas „*laborigi*“ por bona afero, des pli grandan ŝancon vi havos, ke dum la fluo de la tempo tiu mono estos repagata al vi kun kunmetitaj interezoj.

Sed se vi volas provi la forton de via mono plene de malfido kaj uzante nur magran sumon,

vi tre facile venos en la danĝeron *perdi eĉ la malmulton*, kiun vi hezitante riskis. —

Certe vi ne troriskeme spekulu *super viaj fortoj*, kaj vi ĉiam bone pripensu, ĉu la sumo postulata por afero *akordiĝas* kun via *disponebla* posedaĵo, alie eĉ la spirite plej valora afero, kiu estu ankrata per via mono en la mondo de materio, povas fariĝi por vi malbeno kaj malfeliĉo.

Ĉiu afero, per kiu vi alportas al la homaro *efektivan utilon*, pli aŭ malpli frue kreos *kun plena certeco* ankaŭ novajn *materiajn valorojn*, sed ĉiu afero postulas, ke oni risku *adekvatan valoron*, kaj se vi ne havas ĝin, tiam vi prefere ne partoprenu en la afero, eĉ se ŝajnas, ke la progresigo de tiu afero promesas altan profiton kaj povus alporti grandan avantaĝon al ĉiuj homoj.

Vi dekomence agus *malhoneste*, se vi volus atendi *profiton*, sen esti kapabla riski la adekvatan valoron.

Krome, vi neniam devas investi *la monon de aliaj homoj* en aferon por vi gravan, se vi ne scias kun certeco, ke tiuj aliuloj fakte *disponas* la necesan plenan valoron, kiu garantias la kre-

adon de novaj valoroj kaj sekve adekvatan profiton.

Alie vi povus senigi tiujn aliulojn je ilia havaĵo, kaj la spiritaj leĝoj de la homara tuto respondecigus sole *vin* pri la rezultinta damaĝo.

Tiuj leĝoj povas iumaniere atingi ĉiun individuon, kaj ili tiam postulas *pagadon ĝis la lasta monero*, indifere, per *kiuj* ekvivalentoj vi povas pagi kompenson, kaj eĉ se la aliulo, al kiu vi kaŭzis damaĝon, per tio ne *persone* ricevos kompenson.

La leĝoj regantaj en la tuthomara organismo *neniam* celas „kompensi la damaĝon“ suferitan de *individuo* aŭ „puni“ la kaŭzinton de la damaĝo. – Ili devas nur estigi ekvilibron en la vivo de la *homara tuto*, kaj por ili ĉiu unuopulo povas preni la lokon de aliulo, povas nesciante fariĝi instrumento de ilia senindulga, aŭtomate reguligita agado...

En pli alta senco, vera *posedo* de mono *ne ekzistas*.

La ŝajna posedanto estas nur la *portempa administranto* de parto de la valoroj kreitaj en la materia mondo per la agado de la homaro en ĝia tuteco. —

La *grandeco* de la ŝajna *posedo* de mono montras nur la *taŭgecon* de homo kiel *administranto* de valoroj, kaj kiu fidele administras *malmulton* kaj *per tio kreas novajn valorojn*, tiun homon la spiritaj leĝoj, regantaj en la tut-homara organismo, iam kun plena certeco stariĝos kiel „administranton“ super *multon*, se lia *volo*, kaj ne nur lia *dezirado*, serioze alstrebas tion. — — —

La „ĉiamaj malsukcesoj“, pri kiuj tiom multaj, ŝajne kapablaj homoj plendas, pruvas nur, ke ili kutime agas iumaniere *kontraŭ* spiritaj leĝoj, ne sciante tion.

Aŭ la *volo* estas malforta kaj *deziroj* prenas ĝian lokon, aŭ nur *parto* de la leĝoj estas plenumata, sed *alia parto* ne atentata...

Tre multaj ankaŭ ne scias, ke tute *ne dependas de ilia plaĉo*, ĝis kia *sumo* ili povas krei novajn materiajn valorojn, sed ke *ĉiu* riskitaĵo

*devas krei sian difinitan sumon da novaj valoroj, indifere, ĉu tiu sumo superas aŭ malsuperas la deziratan rezulton. – –*

Tiel kelkaj homoj laboras jaron post jaro kaj plendas pri siaj „malsukcesoj“, ne sciante, ke ili *grave rompas spiritajn leĝojn*, kies ekziston ili neniam ekkonsciis.

Oni nun facile povus supozi, ke mi tie ĉi pensas nur pri tiuj homoj, kiuj, uzante propran aŭ aliulan monon, direktas *siajn proprajn entreprenojn*.

Sed mi pensas ne malpli pri la multaj miloj da homoj, kiuj estas en la servo de *alia* homo.

Tie ĉi, *tutaj kategorioj* devas suferi pro la leĝorompoj de unuopuloj, kaj tial la respondeco de individuo kreskas ĝis giganteco, dum la *atentado* de la spiritaj leĝoj, pri kiuj mi parolas, *samamaniere faciligas* la vojon al *mi*loj.

En la momento, en kiu vi devontigas vin al servado en la entrepreno de aliulo, vi prenas sur vin la *tutan respondecon* por tiu *parto* de lia entrepreno, kiu estas konfidita al *vi*, kaj ĉiuj agoj kontraŭ spiritaj leĝoj, pri kiuj vi kulpiĝas, rezul-

tigos por vi la *samajn* sekvojn, kiel en la okazo, se vi direktus, je via propra konto, *vian propran* entreprenon.

Mi ne povas doni al vi pli bonan konsilon, ol ke vi agu en via pozicio, ĉu alta aŭ nesignifa, ĉiam tiel, kiel vi agus, se vi devus plenumi la *samajn* taskojn en *via propra* entrepreno.

Se vi sentas vin „malbone salajrata“, tiam provu ricevi *pli bonan* salajron *ene de la limoj de la ekzistantaj ebloj*, sed ne forgesu, ke eĉ *la plej malbona* salajro *neniam* liberigas vin de *via devo*, pensi kaj agi laŭ la spiritaĵoj regantaj en la regiono de l' mono, se vi ne volas suferi *damaĝon* pro tio, ke vi *kaŭzas* *damaĝon* al *aliulo*. — —

Vi ankaŭ sciu, ke *spiritaĵoj* ĉiam plej juste difinas *vian* rekompencan *ekzakte laŭ la kvanto de la laboro farita de vi*, tiel ke ĉio, kion la aliulo, al kiu vi servas, eble maljuste *ne donas* al vi, devas iam iumaniere esti pagata al vi ĝis la lasta helero, dum en la *alia* okazo, — se vi ricevas *pli altan* rekompencan, ol la kvanto de *vijaj* laboro kaj intereso pravigas, — ĉio, kion vi

ricevis *troe*, estos pli aŭ malpli frue, kun absoluta certeco, *repostulata* disde vi. –

Por la ekvilibriga procezo, estigita de tiuj spiritaj leĝoj, *ĉiuj* formoj de valoro estas egalaj, tiel ke eble estas donata al vi, aŭ forprenata de vi, en *tute alia* „valuto“ tio, je kio vi havas rajton, aŭ tio, kion vi maljuste ricevis.

Mono reprezentas *ĉiujn* materiajn valorojn, kaj estas tute indiferente por la ekvibrigo, kiun la spiritaj leĝoj devas fari, per *kiu* el tiuj valoroj ili faras la ekvibrigon, aŭ ĉu ili povas fari ĝin per la *reprezentanto* de ĉiuj materiaj valoroj: per *mono*.

Nun vi komprenas, kial mi nomis la monon „io sankta“, ĉar ĝi reprezentas ĉiun valoron, kiun la *materia* tero donas, – ĉar ĝi estas esprimo de ĉiu valoro, kiun *la spirito* tie ĉi kreas *per sia influo sur la materio*, kaj samtempe servas al tiu influado kiel interligilo kaj portanto. –

Vole aŭ nevole vi devos rigardi la monon kiel unu el la instrumentoj por krei vian teran *feliĉon*, kaj se vi *volas* krei ĝin, vi devas lerni *atenti* la leĝojn, por kiuj la *mono* kaj *ĉiuj* materiaj

valoroj, *reprezentataj* de mono, estas nur servantoj de *spiritaj* impulsoj...

## OPTIMISMO

Kiu decidis krei sian *feliĉon*, por tiu ne plu ekzistas „*griza ĉiutageco*“, *timo*, aŭ *zorgo*!

Li scias, ke li portas en si *potencon*, kiu *venkas* ĉion *malluman*, ĉion *minacantan*.

*Hodiaŭ* li ne zorgas pri tio, kio eble estos *morgaŭ*, kaj tamen ĉiu el liaj tagoj *preparos* al li en plej bona maniero la *venontan* tagon.

Li scios lerni vivi en la *estanteco* kaj, kiel *kreanto*, *formi tion estantan*.

Li estos la formanto de sia propra *vivo*, kaj *instruos* per sia propra *ekzemplo* la arton fari la vivon *vivinda*, al ĉiuj, kiuj proksimiĝas al li.

Li ne havos tro multajn lernantojn, sed *ĉiu*, kiun li per sia ekzemplo *instruas*, baldaŭ kiel „kuracito“ kuracos *aliajn* kaj tiel helpos malpliigi la nombron de malsanaj ĉeloj en la tuthomara organismo.

Vere, estas *necese*, ke la „malsanaj ĉeloj“ en la spirita korpo de la homaro *saniĝu*, kaj ĉi tie *ĉiu unuopulo* havas la *devon* kontribui la siaĵon al ilia kuracado.

Ĉiu portas en si *ŝuldon de antaŭ eonoj*, kiu estas *pagenda*, ĉar kio ajn en tiu tuthomara korpo estas *malsana kaj difektita*, tion *ĉiu individuo* en sia „origino“ *kunkulpis*, kiam la *homaro* malligis sin el la *Dieco*...

La tuta senfina kosmo povus esti ĝardeno de nedirebla *beateco*, se neniam estus okazinta tiu *origino*, kiun nur eonoj povas fine fermi.

Sed ankaŭ hodiaŭ, dum nia *vojiro* tra tiuj eonoj, la tero povas vidi multe pli da *feliĉo*, ol la homaro sentas kaj *volas* kredi, kvankam en tiu ĉi kosma eono „ĉiela“ vivo certe ne estas atingebla.

Ne dependas de novaj *formoj de socio* en la ekstera vivo de la popoloj kaj landoj, se la abundo da tera feliĉo, kiu *povas estiĝi, realiĝu* en la vivo.

Ĉiu ekstera formo de socio estas nur *provizoraĵo*, kiun konsilas al ni obtuza sentado de nia *unueco* en la *spirita tuthomara organismo*, por

ke ni ne *plene* dekutimiĝu de la konscio pri nia *unueco en la spirito*.

Estas nur „*membra konscio*“ tio, kio ankoraŭ konserviĝas en la formo de „*ŝtato*“, „*nacio*“ kaj „*popolo*“, sed por tiu, kiu ne sukcesas senti sin kiel parto kaj centro de la *tuta* spirita homara korpo, provizore sufiĉu la konscio, ke li estas parto de *membro* de tiu *spirita korpo*, por ke li *ne plene malligu* sin el la unueco kaj la vivo-fluido de la *homara tuto*.

Sed *malsaĝa* kaj egala al *memmalpurigo* estas ĉiu *malamo* kaj ĉiu *malestimo* de unu el tiuj homaraj membroj kontraŭ alia!

*Odoro de putrado* etendiĝas ĉirkaŭ la malamo de tiaj membroj de la homara korpo...

Ĉiam ĝi pravas *putradon* kaj *malkomponiĝon* de ĝiaj *unuopaj ĉeloj*.

Ofte ĝi estas la venena haladzo de *pestbubono*, la fetoro de *pusaj ulceroj*, kiuj konsumas la malsaniĝintan membron kaj minacas rabi ĝian vivmedolon. — — —

„*Kiu ne scias honori la fremdulon kaj la homon de alia gento, tiu ne meritas esti nomata la*

*ido de nobla popolo*“ – diras plej profunda ori-  
enta saĝo, kiu, posedante *plej altan ekkonon*,  
celis eduki la popolon al *respekto antaŭ si*  
*mem...*

Veran respekton antaŭ vi mem vi povas atin-  
gi nur, se vi konas vian *respondecon*, kaj vian  
respondecon vi ne povas koni, dum vi ankoraŭ  
*ne scias*, ke vi, kiel parto de la spirita homara  
tuto, estas respondeca *ne nur antaŭ vi mem*, sed  
same antaŭ *tiu tuto*. – –

Se vi estas kreanto de via *feliĉo*, vi pliigas la  
kvanton da feliĉo sur tiu ĉi tero kaj, per tio, ser-  
vas al la homara tuto *pli*, ol se vi penas realigi  
en la ekstera mondo la teoriojn por ĝi plej fe-  
liĉigajn.

*MENZI* diris: „La ĝusta *agado* direktiĝas al *tio*  
*proksima*, sed ĉiuj serĉas ĝin en *tio malproksi-*  
*ma*; la ĝusta farado celas *tion facile fareblan*,  
sed ĉiuj serĉas ĝin en *tio malfacile plenumeb-*  
*la*.“

– – –

Eble ankaŭ vi, katenite en la iluzio devi fari  
„ion grandan“, ankoraŭ serĉas tion „*malfacile*  
*plenumeblan*“, – serĉas celojn *ekster* vi, dum

*via plej alta celo estas plej proksima al vi, ĉar ĝi estas trovebla nur en vi mem. — — —*

*Eduku vin mem, kaj per via ekzemplo vi estos edukanto de la homaro, sen arogi al vi rajtojn, kiujn oni ne donis al vi! —*

*Kreu mem vian feliĉon, kaj vi feliĉigos la homojn ĉirkaŭ vi, ebenigos irejon por la „feliĉo de la homaro“! —*

*Sed por krei vian feliĉon, vi devas — malgraŭ ĉio malbona, kio eble renkontas vin, — batale akiri al vi, kun neskuebla energio, la fidon je la venka forto de ĉio bona.*

*Vi neniam devas perdi la kuraĝon, kiom ajn malhele akumuliĝas la fulmotondraj nuboj super via kapo! — —*

*Se vi estas malsana, tiam per via fido reakiru vian sanon, kaj se via korpo estas ankoraŭ savebla, tiam la kuracistoj, al kiuj vi konfidis vin, dankos al vi pro via helpo al resaniĝo. Sed se via korpo ne plu estas kuracebla, tiam vi kreis al vi per via fido stokon da energioj, kiu servos al*

via *spirita* korpo, *tuj kiam* vi estos forlasinta tiun ĉi videblan korpon, kiu turmentis vin.

Se vi estas en *materia mizero*, tiam *per via fido alvenigu* materian helpon, kaj ne ĉesu konservi vian fidon *viva kaj efika* per ĉiuj rimedoj, ĝis helpo alvenis, – dum vi *samtempe* en plena trankvileco plue iras la vojojn, sur kiuj vi, laŭ terhoma juĝo, eĉ *sen* via magio de fido, atendus helpon.

Eble la magia forto de la fido ligos sin kun tiuj vojoj, sed eble venos helpo al vi de flanko, de kiu vi certe ne estus atendinta ĝin.

Sed via konfido al la forto de l' fido neniam devas persvadi vin, ke vi metu viajn manojn en vian sinon, farante nenion, same kiel vi, en okazo de malsano, neniam devas rifuzi helpon prezentata al vi laŭ ekstera juĝo.

La forto de via fido perdus sian *vivoenergion*, se vi ne *samtempe* streĉus ĉiujn *aliajn* fortojn en la sama direkto; kaj se fine la helpo venas el direkto, al kiu vi neniam rigardis, aŭ se ŝajnus, ke via *ekstera* penado estis „tute superflua“, tiam vi tamen ne lasu vin forlogi al tio, ke en estonta

okazo vi *rifuzas* la *eksterajn* rimedojn, kiuj estas al via dispono.

Vi devus amare penti tion, ĉar la forto de via fido neniam povas malhavi la streĉon de *ĉiuj* viaj energioj, se ĝi efektiviĝu por vi. — —

Sen la streĉo de *ĉiuj* viaj ceteraj fortoj, la forto de via fido estas *mola kiel plumbo*; nur per tio, ke, malgraŭ via konfido al la forto de via fido, vi *aktivigas ĉiun energion troveblan en vi* por helpi *vin mem*, igante ĝin *agi eksteren*, la forto de via fido fariĝas *risorteca ŝtalo*, kvazaŭ „Toleda klingo“, kiu ne rompiĝas eĉ je la plej malmola rezisto kaj fine *trabatas* kaj *tranĉas* nodon, kiu alimaniere ne plu estas malligebla...

En *ĉiu* zorgo, en *ĉiu* speco de mizero aplikiĝas la *sama* procezo, se vi volas elprovi *la magiajn fortojn de l' fido* en via ĉiutaga vivo. —

La plej multaj homoj ne scias *fidi efike*, ĉar ili iufoje, en iu situacio, vane provis serviĝi al si la magian forton de la fido, *neglektinte* la *samtempan* uzon de sia tuta energio por *mem* venigi al si helpon de ekstere...

Do ili nun faras la inversan eraron kaj serĉas ĉiun helpon nur en *eksteraj* aferoj, penante kaj turmentiĝante kun nur malgranda sukceso, ĉar ili iam ne sciis *ĝuste* uzi la *plej grandan* forton, al kiu ili povus ordoni, kaj tial *ne plu* povas *konfidi* al la helpa forto de l' fido. –

Nesufiĉa ekkono de la *kondiĉoj de efikado* de spiritaj fortoj malhelpas la plej multajn homojn en la laŭleĝe certa konstruado de ilia *feliĉo*.

Tiel ili venas en la situacion, ke ili rigardas sin *senigitaj* je ĉiu *eblo* feliĉiĝi, kaj dum ili estas en tiu animstato, ĉia feliĉo efektive fuĝas for de ili. – –

Se vi volas surtere *estigi vian feliĉon*, vi devas kun *neskuebla „optimismo“* fidi vian feliĉon kaj vian plenan *rajton* je feliĉo!

Vi devas scii, ke vi plenumas nur vian *devon*, kiam vi strebas per ĉiuj justaj rimedoj al via *surtera feliĉo*, kiu vere povas esti pli ol feliĉo de la *amaso*. –

El ĉio, kio renkontas vin, vi penu eltiri fajron da *feliĉo*, kiom ajn etan, kaj vi konstante klopodu interpreti ĉion kiel kontribuajon al via *feliĉo*!

Ĉiutage de mateno ĝis vespero, neniu okazaĵo, kiom ajn malgrava, preterpasu vin, el kiu vi ne eltiras eron da *feliĉo*, kiom ajn malgrandan.

Ĉiu *rigardo* de viaj okuloj, ĉio, kion vi *aŭdas*, devas postlasi al vi iun ajn malmulton kiel tributon da feliĉo, kaj vi devas tiom al kutimiĝi al tio, kiel la feliĉo fakte sekvas vin sur ĉiuj viaj vojoj, ke fariĝas al vi *nature* kaj *normale*, se iam renkontas vin *granda* feliĉo.

Sen la konstanta *alkutimiĝo* al tio, ke vi *volas* renkonti la feliĉon sur ĉiuj vojoj kaj eĉ en plej malgranda kvanto, vi ne kreos *la ĝustan atmosferon*, kiun vi bezonas por formi vian plenan teran feliĉon. —

Vi devas fariĝi, por vi kaj aliaj, *magneto* altiranta la *feliĉon*, se vi volas fariĝi, baldaŭ kaj sen malsukceso, kreanto de via feliĉo. —

Vi devas lerni esti feliĉa kvazaŭ *pasive*, antaŭ ol vi komencas, kiel *aktiva kreanto*, *formi* la feliĉon de vi *volatan*.

Tiel vi estigas en vi animstaton, kiu igas vin senti la sekretajn *spiritajn leĝojn*, al kiuj la feliĉo obeas.

Tiel vi scios akiri kun certeco *vian feliĉon* kaj *konservi* ĝin, sed *samtempe* vi pligrandigos la eblon, ke ankaŭ *aliuloj* konkeras *ĉiun feliĉon*, kiun la tero havas por doni al ili, kaj kiun ili ne trovas sole pro tio, ke ili ankoraŭ ne scias, ke nur *ili mem* povas fariĝi la *kreantoj* de sia feliĉo.

Neniu *malfeliĉo* en tiu ĉi mondo de abunda malfeliĉo estas tiom granda, ke ĝi povas *daŭre* bari la vojon al la *feliĉo!*

Sed per ĉiu fajrero da *feliĉo*, kiun vi *sentas en via konscio* kiel feliĉon, vi ĉesigas la fluadon de unu el la mil malgrandaj fontoj de malfeliĉo sur la tero, – kaj kiam vi vere estos *kreinta al vi vian feliĉon*, tiam vi liberigis la homaron por ĉiam de unu el la grandaj *marĉoj* de malfeliĉo, kiuj estiĝis sekve de la senpripenseco kaj neinstruiteco de jarmiloj, kaj kiuj povas esti sekigataj nur per la sunoj de *feliĉo kreita de unuopuloj*.

Ju pli da *vere feliĉaj* individuoj troviĝas sur tiu ĉi tero, des pli la forto de l' kaoso malaperos

de sur ĝia surfaco, forto, kiu hodiaŭ kreas ankoraŭ tiom da malfeliĉo. — —

Estas *sizifa laboro*, peni forigi la malfeliĉon sur tiu ĉi tero *alimaniere*, ĉar feliĉo kaj malfeliĉo estas nur rezulto de la efikado de spiritaj leĝoj, sed la okultaj fortoj aŭtomate agigantaj en tiu ĉi universo ĉion, kion ni nomas „malfeliĉo“, estos neniam *paralizeblaj*, krom se la fortoj de la feliĉo povas, estante *konscie sentataj*, energii pliintensigite — kiel elektra kurento en bobeno el kupra drato — en tia grado, ke ili kapablas *tiregi* la fortojn de la malfeliĉo *for de ilia direkto*, tiel ke ili tiam same aŭtomate devas servi al *krea konstruado* en la mondo de la homo. — — —

Por deturni ĉiujn „fortojn de malfeliĉo“ *en la vasta universo* for de ilia detrua direkto, nia *tera voloforto* ne sufiĉas, kaj la homo de la tero ankoraŭ sentus ilian influon, eĉ se li sukcesus *ekmatri* ĉiujn fortojn de malfeliĉo en tiu ĉi planedo. — — —

Sed *sur tiu ĉi tero*, sur la planedo *portanta lin*, ĉiu *unuopa homo* povas, per sia *volo* al fe-

liĉo, fari verajn „miraklojn“, kaj ju pli da homoj sin ekzercas tiurilate, des pli granda fariĝos la nombro de *feliĉuloj*, de *portantoj* de feliĉo tie ĉi sur la tero. –

Sed pro tio, ke ĉio estas *ligita* kun ĉio alia per misteraj fortoj, la pligrandigita feliĉo sur tiu ĉi planedo energias „eksteren“ *en la tutan universan spacon*, kaj neniu imago estas tro fantasta por ne tamen *malatingi la realon* – imago, kiu volas formi al si bildon pri la *efikoj*, kiuj povas estigataj de rapide pligrandigita *sentado de feliĉo* sur tiu ĉi tero, kaj eksteren ĝis la plej malproksimaj spacoj de la universaj sferoj...

## EPILOGO

La malmultaj homoj, kiuj jam en griza pratempe konis ĉi tiujn leĝojn kaj vivis laŭ ili, longe povis transdoni sian scion nur al siaj elprovitaj disĉiploj. Dum jarmiloj ili trovis plej diversajn okazojn por esplori tiujn leĝojn, sur kiuj tiu ĉi libro baziĝas, ĝis iliaj finaj disbran-

ĉiĝoj, kaj por elprovi ilian *efikecon* je si mem kaj en sia propra vivo.

Vi do povas, kun bona kaŭzo, konfidi vin al tiu ĉi gvidado, kaj se vi deziras ekscii plion pri ĝi, vi trovos detalan informon en miaj libroj „pri la vivanta Dio“, „pri la Transa Mondo“, „pri la Homo“, same kiel en „La Libro de la Reĝa Arto“ kaj „La Libro de Interparoloj“.

Mi nun finas la „Libron pri la Feliĉo“, profunde dezirante, ke ĝi montru al vi la vojojn, sur kiuj vi fariĝas *kreanto de via feliĉo*. –

Multo povus ankoraŭ esti dirata pri la *specoj* de la feliĉo, kiun vi povas krei al vi sur tiu ĉi tero, sed vi certe ne volos supozi, ke mi intence pretervidis iun homan feliĉon, ĉar mi ne menciis ĝin en tiu ĉi libro.

Se vi scias legi ĝuste, vi trovos bone aplikeblan instruon por *ĉiu* speco de surtera feliĉo.

Tie ĉi mi volis diri al vi en *la plej konciza* formo ĉion *esencan*, kion vi devas atenti rilate al *ĉiuj* specoj de homa feliĉo, kaj mi elektis nur unuopajn elementojn de terhoma feliĉo, kiuj taŭgis por montri aparte klare, kion tiu ĉi in-

struo pri la feliĉo celas. Mi ne povis eviti ĉiun ripeton; alie la klareco certe estus suferinta.

Sed mi klopodis uzi tiom malmultajn paĝojn kiom eble kaj tamen tuŝi ĉiujn punktojn, kiuj ŝajnis al mi esti valoraj por ebligi al la leganto klaran ekkonon de la materio.

Mi ne deziras, ke oni legu miajn librojn kiel oni legas novelojn, kiujn oni formetas atinginte la lastan paĝon, kaj eble ekprenas plu neniam en sia vivo.

Mi jam scias pri multaj, al kiuj miaj libroj fariĝis *konstantaj akompanantoj*, kaj mi esperas, ke ili *fariĝos* tiaj al multaj aliaj homoj.

Kvankam mi skribis ĉiun el miaj libroj kun la intenco doni al mia leganto *konstantan* konsilanton, mi tamen aparte deziras, ke ĉiuj legantoj havu tiun ĉi „libron pri la feliĉo“ ĉiam prete sub la mano; ĉar dum en aliaj libroj mi traktas aferojn, kiuj ofte estas tre malproksimaj de la ĉiutaga vivo, mi kredas, ke mi tie ĉi diris multon, kiu ĉiutage povas prezenti okazon por *denove* ekpreni la libron, por plene konatiĝi kun ĝia instruo.

Ĝi certe neniukaze malutilos vin, kaj eble povas – iom post iom, malgraŭ ĉiuj malagrablaĵoj ĉirkaŭantaj vin – fari vin *feliĉa optimisto*, kiom ajn firme vi eble ankoraŭ alkroĉiĝas al konstante *pesimisma* pensmaniero.

Vi ne lasu vin erarigi de tiuj homoj, kiuj volas pruvi al vi baze de sia „vivosperto“, ke la *feliĉo fuĝas* de la vojo de kelkaj homoj, kvankam ili konstante strebas renkonte al ĝi.

Kiu tion spertis en sia vivo, tiu prefere demandu sin, per kiu eraro li *mem baris la vojon* al la feliĉo, kiu volis atingi lin.

Li demandu sin, ĉu lia propra „troa agemo“ ne fortimigis la feliĉon de ĉe lia flanko. –

Certe, ĉiu tera feliĉo devas esti *kreata* de vi, sed la kvieta agado de la *kreanto* treege diferencas de la maltrankvila trozorgemo, kiu ĉiam timas, ke io aŭ alio povus esti „preteratentata“, kaj dume neglektas tion plej bonan: *la kvieton de la animo*, sen kiu la tera feliĉo estas neniam atingebla. – – –

Estigu en vi gaje serenan fidon pri via *rajto* pri feliĉo, kaj neniam lasu iun malsukceson forpeli vin el la sekura ĉirkaŭbarejo de via bone bazita fido!

Estu konvinkita, ke ĉiam fortoj kaj potencoj agadas por helpi vin, tuj kiam vi *mem volas* akiri vian feliĉon kaj ne nur sopiras ĝin per senforta *dezirado!*

Serene iru la surteran vojon donitan al vi, kaj ĉiutempe gardu *vian internan trankvilon*, kiom ajn forte de ekstere la „batoj de l' sorto“ eble pluvas sur vin.

Se vi lasas tiri vin el via *trankvilo*, vi estas perdita, sed la fortoj kreantaj malfeliĉon sur tiu ĉi tero neniam povos vere venki vin, se vi, malgraŭ ilia furiozado, en konstanta *trankvilo fidas* al via *feliĉo* kaj al la *helpantaj potencoj* starantaj ĉe via flanko. — — —

Kun iom da *persisteco* vi povos certe krei vian feliĉon, eĉ se en tiu ĉi horo vi ankoraŭ estas ĉirkaŭita de ĉia speco de „malfeliĉo“. —

Ne kredu tion, kion alia instruo rakontas al vi pri la malgranda ebleco de feliĉo sur la tero!

Anstataŭe kredo je via *rajto* kaj via *devo* atingi vian feliĉon, kaj, en gaje serena certeco, *fidante* kaj *kun firma volo*, *kreu* vian feliĉon, por ke ankaŭ *vi* iam estu unu el la *feliĉuloj* sur tiu ĉi terglobo.

Fino

Tradukoj de pliaj libroj  
el la instrua verkaro de Bô Yin Râ  
estas elŝuteblaj ĉe jena retejo:  
<http://www.a-rehfeldt.de>